

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

34-a Jarkolekto - Decembro 2020 - N-ro 119



Valverde del Camino
(Onubo)

Oktober / Decembro 2020

Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio**
P. 05 La ponto de la germanoj
P. 09 Lingva Angulo:
Los participios en esperanto
P. 15 Nuntempa vortaro:
Vakcinoj / Vacunas
P. 16 Poezia Angulo
P. 18 Folioj por Praktikado
P. 21 Rakonto:
La lasta peceto
P. 24 Turismi en ...
Valverde del Camino
P. 27 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio:
La rakontinda historio de la Pastro Félix
P. 33 $E=mc^2$ Scienca Angulo:
La oliv-oleo
P. 35 Flamenko
La Petenero
P. 37 Fervojista angulo
Fervojoj en la onubaj minejoj
P. 39 Andaluzia kuirarto
Artiŝokoj kun haketita viando
P. 41 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio:
La filinoj de la reĝo Abib
P. 44 Vorto-ludoj
Krucvorto kaj Rebuso
P. 46 Humuro

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López
REDACTORES:
José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante
COLABORADORES:
Vicente Herrera Cobo
Carlos Spinola
Lukas Toczki

*Sur la kovrilo:
Placo Ramón y Cajal en Valverde del Camino (Onubo).*

Esperanto en Andaluzio

RENOVIĜAS GAZETO ANDALUZIA

Hodiaŭ nia revuo estas novaĵo per si mem. La skipo de redaktantoj pligrandiĝis kaj ili decidis renovigi la grafikan aspekton de la revuo. La enhavo estas simila al tiu de la pasintaj numeroj, kvankam iom post iom novaj sekcioj aperos sur niaj paĝoj.

Ni esperas, ke ĉi tiu nova aspekto plaĉu al ĉiuj parolantoj kaj amikoj de la internacia lingvo en Andaluzio. Espereble ĝi estos taŭga prezent-letero de la andaluzia E-movado antaŭ la tutmonda esperantistaro.

Do, bonan legadon!

ZAMENHOFA FESTO EN SEVILO - DECEMBRO 2020



Kvankam preskaŭ ĉiuj esperanto-asocioj tra la mondo organizas renkontiĝojn nur per-komputile, Sevila Esperanto-Asocio decidis festi la kutiman Zamenhofan Tagon per komuna manĝado la pasintan 19-an de decembro.

Ne ĉiuj membroj sukcesis ĉeesti, tamen malgraŭ malsanoj, kaj san-izoligo la etoso estis plenĝoja. Sendube, *“Rezistos mi”* estas devizo de la sevila grupo.

LEGENDOJ DE *BÉCQUER* BALDAŬ APERONTAJ

En la jaro 1972, koincide al la Internacia Jaro de la Libro, Hispana Esperanto-Federacio eldonis la verkon *Kun Sopira Koro*. Sur tiu libro *Fernando de Diego* tradukis la plej konatajn rimojn de la sevila aŭtoro Gustavo Adolfo Bécquer. Sed, kio rilate al la legendoj de tiu sama aŭtoro?

Pasintjare Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ekigis projekton por aperi, tradukitaj en esperanton, kelkajn famajn legendojn de Bécquer. La projekto ekmarŝas kaj espereble dum la kuranta jaro 2021, verko enhavanta legendojn de *Gustavo Adolfo Bécquer* aperos en la internacia lingvo.



Vizitu la TTT-paĝon de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ĉe www.esperanto.ac

esperanto.ac
Asociación Andaluza de Esperanto

ESPERANTO

Universala Kongreso

Esperanto
¿Qué es el ESPERANTO?
Ha sido un sueño desde hace cientos de años que la

lernu!
¿Cómo aprender ESPERANTO?
Se aprende en un momento con el 1ºº curso de

ANDALUZIO, via celo!
ANDALUZIO estas lando suade de Hispanio kaj de



La Ponto de la Germanoj

Ĉi tiu historio komenciĝis la 15-an de decembro 1900 kiam la fregato *Gneisenau*, de la imperia germana mar-armeo alvenis en la havenon de la andaluzia urbo Malago. Tiu germana milit-ŝipo troviĝis tie por transporti germanan diplomaton, kiu devis solvi aferojn en Maroko.

La fregato troviĝis ekstere de la malaga haveno, tiam la havenestro konsilis al la kapitano enirigi la ŝipon en la havenon, pro la fakto, ke forta tempesto baldaŭ atingus la tutan marbordon. Tamen la germana kapitano rifuzis tiun peton.

Post kelkaj horoj la tempesto efektive atingis la havenon de Malago kaj ĝi tute forbatis ĉiujn ŝipojn kiuj troviĝis ekstere de la haveno. Ŝnuroj ligantaj la ankron rompiĝis kaj la fortégaj ventoj ensinkigis la germanan ŝipon. Ĉi ĉio daŭris kelkajn horojn, do en la mateno de la 16-a de decembro multaj germanaj maristoj luktis kontraŭ grandaj ondoj en la maro. Multaj malaganoj, ĉefe tiuj maristoj kiuj troviĝis en sekura loko en la

haveno, ĵetis sin en la maron por helpi la germanajn maristojn, kiuj luktis kontraŭ la maro por savi siajn vivojn.


La rezulto estis terura, forpasis dronintaj 41 germanaj maristoj kaj 12 malaganoj, kiuj celis savi ilin. Ankaŭ la kapitano kaj la unua oficiro de la germana ŝipo estis viktimoj de tiu sinkigo. Oni entombigis la germanajn maristojn en la brita tombejo de Malago. Tie, ankoraŭ estas videbla gravuraĵo kun la nomo de ĉiuj ili kune kun lignaĵo de la ŝipo.

La hispana reĝo dankis la agadon de la malaganoj kaj oni koncesiis al la urbo montri en ties blazono la enskribon *Muy Hospitalaria* (Tre gastema) por memorigi ĉiam la kuraĝan agadon de tiuj malaganoj kiuj riskis sian propran vivon por savi la germanojn.


Kelkajn jarojn poste, en 1907, la urbo suferis impetan akvo-fluon, la rivero *Guadalmédina*, ofte tute seka, ricevis grandan kvanton da akvo pro pluvado kaj ĝi elbordiĝis. Je la unua 5

horo matene de la 24-a de septembro 1907 granda kvanto da akvo, koto kaj ŝlimo detruis unuamomente la ponton *La Aurora* kaj poste la ponton de *Santo Domingo*. Okaze de la inundo 21 homoj forpasis kaj la detruo de konstruaĵoj, stratoj kaj ĉefe pontoj estis ankaŭ terura.

Kiam tiu novaĵo pri inundo en Malago disvastiĝis en Germanio, oni lanĉis kampanjon por helpi tiun andaluzian urbon, kies anoj antaŭ kelkaj jaroj ne dubis riski siajn proprajn vivojn por helpi la germanajn maristojn. Tiel oni komencis kolekti monon por helpi Malagon.



La germana fregato *Gneisenau* kiam ĝi alvenis en la malaga haveno ... kaj post ĝia sinkigo la 16-an de decembro de 1900.



Imperiestro Vilhelmo la 2-a eĉ komencigis la liston de donacantoj. Fine oni decidis rekonstrui unu el la pontoj detruitaj, ĝuste tiu de *Santo Domingo* kiu ekde tiam estas konata kiel *La Ponto de la Germanoj*.

En la jaro 2009 oni festis la unuan jarcenton de la Ponto de la Germanoj, kaj oni okazigis feston kun la ĉeesto de la germana konsulo kaj ankaŭ membroj de la germana aristokratara heredantoj de la imperiestro Vilhelmo la 2-a.

Kvardek unu germanaj maristoj pereis, ankaŭ dek du malaganoj kiuj klopodis savi ilin.

En la jaro 1982 estis videbla la kadukiĝo de la ponto kaj tiel la malaga urbestro petis la kunlaboron de la germanaj aŭtoritatuloj, tiam de la Federala Germana Respubliko, por ripari ĝin. Kompreneble Germanio akceptis kaj ekde tiam plato memoras la originon de la ponto, kies teksto proklamas:

“Germanio donacis al Malago ĉi tiun ponton por danki la heroan helpon havigita de la urbo al la ŝip-rompuloj de la milit-fregato ‘Gneisenau’ 1900 – 1909”

Kiel kuriozaĵo oni devas diri, ke kelkaj el tiuj survivantoj de la germana ŝipo restis en Malago post la sinkigo, inter ili la patro de fama malaga muzikisto Emilio Lehmborg Ruiz.



ALIĜU AL Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac

Jara kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- BANKIA ES57 2038 9814 8360 0059 5212

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2021.



HAZTE SOCIO DE LA Asociación Andaluza de Esperanto

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

Para hacerse socio contacta con: cordoba@esperanto.ac

Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- BANKIA ES57 2038 9814 8360 0059 5212

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:

- Nombre del nuevo socio.
- Concepto: Cuota 2021



En esperanto existen dos tipos de participios: participios activos y participios pasivos. Lo primero que hay que decir es que los participios pueden adoptar la terminación de sustantivos (-o), adjetivos (-a) y de adverbios (-e). Por ejemplo, si lee cualquier libro, será un *leganto*, es decir, un lector. En el ejemplo anterior, hay un participio activo (-ANT) que adopta la forma de sustantivo. Vamos a ver en profundidad estos participios y sus usos en esperanto. *Ek!*

PARTICIIPIOS ACTIVOS

Los participios activos presentan una acción que realiza el sujeto. En esperanto, existen tres formas: -ANT (presente), -INT (pasado) y -ONT (futuro).

El participio activo presente indica una acción que está transcurriendo:

Mi estas **leganta** libron pri filozofio.
Yo estoy leyendo un libro sobre filosofía.

El participio acativo pasado, entonces, indica una acción que transcurrió en el pasado:

Mi estas **leginta** libron pri filozofio.
Yo he leído un libro sobre filosofía.

Por último, el participio activo futuro indica una acción que transcurrirá en el futuro:

Mi estas **legonta** libron pri filozofio.

Yo estoy a punto de leer un libro sobre filosofía.

Es de vital importancia ver que el verbo principal es el mismo en todas las oraciones y que lo único que cambia es el participio activo. Téngase cuidado a la hora de «hacer malabares» con el verbo principal, puesto que el significado variaría: *estis leginta* (había leído), *estas leginta* (he leído), *estos leginta* (habré leído). En este sentido la precisión es fundamental.

mi estas leganta > *yo estoy leyendo*

mi estas leginta > *yo he leído*

mi estas legonta > *yo estoy a punto de leer*

Estas formas se pueden acortar perfectamente: *estas leganta* pasaría a ser *legantas*. El significado no cambia; es una cuestión de estilo y también de economía del lenguaje.

Obviamente, no todo son verbos. También se pueden hacer sustantivos. Zamenhof en su obra *Fundamenta Krestomatia de la Lingvo Esperanto* utiliza, por ejemplo, *viandomanganto*. ¿Qué significa *viandomanganto*? Pues *viando* significa carne, pero ¿Y *manganto*? *Manganto* es un participio activo que significa el que come (comedor). *Viandomanganto*, pues, sería un ser animado (persona o no) que come carne, literalmente: comedor de carne. Pero veamos participios activos más comunes que, incluso en español, son usados:

Studanto > el que estudia, es decir, estudiante.

Prezidanto > el que preside, es decir, presidente.

Recordemos que el esperanto también cuenta con participios activos pasados y futuros. En este caso, por ejemplo, Mariano Rajoy sería *prezidinto*, es decir, el que presidía o expresidente. Si un candidato gana las elecciones y sabemos que será presidente podemos decir *prezidonto*, es decir, el que presidirá o, para ser breves y concisos, el futuro presidente.

Por último y no por ello menos importante, los participios activos pueden ser adverbios. Estas formas muestran una acción complementaria relacionada con el sujeto del verbo. Vamos a tomar ejemplos del famoso *Plena Manlibro de*

Manĝante pomon li legis sian libron.

Mientras comía una manzana, leía su libro.

Si queremos evitar el uso del participio activo simplemente diríamos: *dum li manĝis pomon, li legis sian libron*. Otro ejemplo:

Farinte sian taskon li iris hejmen.

Cuando acabó su trabajo, se fue a casa. También se podría traducir como «*cuando hubo acabado su trabajo...*», forma mucho más elegante, pero a la vez menos usada (desgraciadamente) en español.

No está de más recordar lo importante que es saber utilizar el acusativo, una pieza fundamental de la gramática del esperanto. Véanse estos ejemplos extraídos del libro *La tuta Esperanto*:

Mi kredis la viron *dormanta* vs Mi kredis la viron *dormantan*

La única diferencia es que el participio acativo presente de la segunda oración tiene la terminación de acusativo. Sin embargo, el significado varía muchísimo: mientras que la primera significa «yo creí que el hombre estaba durmiendo», la segunda significa «yo creí al hombre que estaba durmiendo (*durmiente*)». Este tipo de frases solo constata un hecho: el acusativo es una pieza imprescindible, de gran utilidad y precisión en esperanto.

Farinte > Habiendo hecho.

Farinte mian laboron mi jam povas ripozi.

Farante > Haciendo.

Farante mian laboron mi ne ripozas.

Como último apunte, en la lengua oral se prefiere formas mucho más sencillas como *legas*, *legis* o *legos*, mientras que en la lengua escrita sí que hay una abundancia de estos participios, ya que se tiende a una riqueza de detalles que la lengua oral carece en ciertos casos. No obstante y como ya se ha dicho anteriormente, esto es una cuestión de estilo, por lo que cada persona puede usar más o menos los participios activos en función de sus preferencias. Sin

embargo, hay veces en las que se debe usar el participio activo sí o sí: si alguien le llama y usted tienen intención de hacerlo, puedes decir *mi ĵus estis telefononta vin* (estaba a punto de llamarte). Una frase como la anterior es imposible hacerla con las formas simples (-as, -us, -os...): puedes decir *mi volis telefoni vin*, pero el significado no es el mismo, sino parecido. De ahí que el participio activo tenga una utilidad infinita y se pueda mostrar con él un alto grado de detalle cuando se sabe utilizar a la perfección. Conviene, en consecuencia, aprender a usarlo.

mi estas leganta = mi legantas

PARTICIPIOS PASIVOS

Los participios pasivos presentan una acción que realiza el objeto. En esperanto, existen tres formas: -AT (presente), -IT (pasado) y -OT (futuro).

El participio pasivo presente indica una acción que transcurre en el presente:

La libro estas **legata**

El libro está siendo leído.

El participio pasivo pasado indica una acción ya acabada:

La libro estas **legita**

El libro ha sido leído.

Por último, el participio pasivo futuro indica una acción que se desarrollará en el futuro:

La libro estas **legota**

El libro está a punto de ser leído.

Al igual que los participios activos, los participios pasivos pueden «absorber» el verbo principal: *estas legata* pasaría a ser *legatas*.

Obviamente, los participios pasivos también pueden ser adverbios. Véase la siguiente frase (extraída de *La tuta Esperanto*): kiel **dirite**, mi ne povas prunti al vi monon, ĉar mi mem ne havas (*como he dicho* [lit.: como se ha dicho], *no puedo prestarte dinero, ya que no tengo*).

También pueden ser sustantivos, aunque suelen ser infrecuentes.

La principal diferencia entre los participios activos y los participios pasivos es que estos últimos tienden a ser usados más en la lengua oral.

CURIOSIDADES

Hay una serie de verbos como *okupi* y *kovri* que son llamados *duvizaĝaj verboj* (verbos de dos caras), puesto que tanto la forma -IT como la forma -AT pueden ser válidas, dependiendo del contexto. Esto se debe a que en ciertas ocasiones, estos verbos expresan comienzo y en otras ocasiones expresan duración. Veamos, a modo de ejemplo, la siguiente frase:

La poto estas **kovrita** de mi. La poto estas **kovrata** de kovrilo.

*El tarro **fue cubierto** por mi. El tarro **está siendo** cubierto por una tapa.*

Relativo a lo anterior, hubo una disputa gramatical entre los años 1930 hasta finales de los años 1960 sobre si era más correcto utilizar -IT o -AT ¡Incluso hay obras que tan solo hablan de esto! A pesar de que nos pueda parecer un suceso lejano, hoy en día se sigue discutiendo sobre este mismo tema.



Existe también un «experimento» de dos participios, uno activo y otro pasivo: -UNT y -UT, respectivamente. Son los propios del condicional. Obviamente, no forman parte del esperanto «oficial». Su uso es residual. Bertilo Wennergren comentaba humorísticamente que «kvazaŭ tio ne sufiĉis, iu frenezulo volas aldoni -unta kaj -uta [*por si fuera poco, algún loco quiere añadir -unta y -uta*]

FUENTES

Hay algunos libros que se pueden consultar al respecto. Para un principiante no cabe esta posibilidad, puesto que los libros que a continuación se recomiendan están totalmente en esperanto. No obstante, hay cursos suficientes en español para aprender esperanto (¡y los participios!), como *Nuevo Método de esperanto para clases y autodidactas* (Fernando de Diego) o el popular *Curso del idioma internacional* (Miguel Gutiérrez Adúriz). También existe una explicación en la página web lernu.net (aunque desgraciadamente está parcialmente traducida): <https://mallonge.net./ac>

Si habla esperanto, puede consultar los siguientes libros para profundizar en los participios o en otros aspectos de la gramática:

Kalokcsay, K y Waringhien, G. (1985). *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. Universala Esperanto-Asocio.


Seppik, H. (1937). *La tuta Esperanto*. Recuperado de: <https://mallonge.net/aa>

Wennergren, B. (2020). *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. Edición del autor.

También se puede ver en YouTube una lección de Bertilo Wennergren sobre los participios, en concreto, sobre las *kunmetitaj verboformoj*: <https://mallonge.net/ab>

Verkis: Alejandro Burgos Escalante

Retpoŝtadreso: alejandroburosescalante@gmail.com



VAKCINO estas substanco, injektebla aŭ trinkebla, estiganta ĉe la organismo imunecon kontraŭ iu mikroba aŭ parazita malsano.

Se temas pri injektebla vakcino, jen la partoj de la **injektilo**:



Laŭ la loko de la apliko oni distingas:

- subkutanen aŭ subhaŭtan,
- intravejnan,
- intramuskulan.

10 nepraj vortoj pri vakcinoj:

- *Efectos secundarios*: Flankaj sekvoj
- *Sistema inmunitario*: Imuna sistemo
- *Inmunidad de grupo*: Grupa imuneco
- *Inmunización*: Imunigo
- *Vacuna efectiva contra...*: Efektiva vakcino kontraŭ...
- *Reacción*: Reakcio
- *Dosis*: Dozo
- *Anticuerpo*: Antikorpo
- *Voluntarios*: Voluntuloj
- *Ensayo Clínico*: Klinika provo

POEZIA

ANGULO

MEMPORTRETO



En mia knaba aĝo, korteto en Sevilla,
maturaj or-citronoj en sun-banata horto.
En mia juno, dudek da jaroj en Castilla.
En mia vivo, faroj... Pri ili, muta vorto.

Ne estis mi Donjŭano nek Bradomin frivola
-vi scias, mi surportas nemodan veston ŝiman-
sed ankaŭ mi trafiĝis de l'fluga sag' Amora
kaj amis kion inoj posedas grand-animan.

Sangeroj jakobenaj en miaj vejnoj fluas,
sed mia verso venas el fonto milda-sona.
Mi ne observas ritojn, kiel la mor' instruas,
sed estas, en la senco de l'vorto, ulo bona.

La belon mi adoras. En una estetiko
eltondis oldajn rozojn de la Ronsard-ĝardeno.
Al mi ne plaĉas tamen nov-arta kosmetiko,
nek sidas mi kun birdoj de l'moda tril-refreno.

Naŭzegas min arioj bombastaj de tenoroj
-nu, la koruso grila la lunon ne alzumu!-
La voĉojn mi distingas el tonoj sen sonoroj
kaj tre atente aŭdas, inter la voĉoj, unu.

Ĉu mi estas klasika? Ĉu eble romantika?
Mi volus miajn versojn, kiel hero' la spadojn:
jam famaj de glor-agoj pro mano tre fortika,
ne pro la nura belo de la lameno-briladoj.

En mia kor' mi ĉiam parolas kun kompano
-la parolanto en si parolos mem kun Dio-
kaj per la dialogoj, sub lia gvida mano,
mi lernis la sekreton de la filantropio.

Vi ŝuldas al mi ĉion pro miaj versoj, homo.
Mi al vi, ne. Mi faras mian laboron, pagas
per mia mon' por lito, por manĝo, por la domo,
por la surkorpa vesto, en kiu mi plu vagas.

Kaj jam en la momento de la vojaĝo lasta,
kiam navigi pretos la fantomo-barko muta,
surŝipe mi troviĝos leĝera, senbalasta,
kaj, kiel maraj viroj, veturos preskaŭ nuda.

Antonio Machado

Tradukis en esperanton Fernando de Diego en
la libro *Sentempa simfonio. Poem-antologio
hispana* (Madrid, 1987)





Folioj por Praktikado

La 28-an de februaro

La 28-an de februaro andaluzoj festas la Tagon de Andaluzio. **Temas pri** festo-tago, tiam balkonoj kaj stratoj **pleniĝas je** andaluziaj flagoj. Tamen, kion ni festas?

Post la forpaso de la ĝeneralo Franko, kiu **estris** en Hispanio de 1939 ĝis 1975, la 4-an de decembro 1977 preskaŭ **du milionoj da andaluzoj** eliris sur stratojn, kunvokitaj de parlamentanoj, por peti aŭtonoman statuton.

Post multaj petoj, protestoj kaj manifestacioj, la 28-an de februaro de 1980, la hispana registaro organizis referendumon. Tiam **la demando proponita estis ĉu oni deziris** atingi plenan aŭtonoman statuton aŭ alian sen tiom da kapabloj.

Por atingi kompletan aŭtonoman statuton estus necese atingi favorajn voĉojn superaj al **50 procento el** la listo de eblaj voĉ-donantoj de ĉiuj andaluzaj provincoj, tio estis andaluzoj **pli ol 18-jaraĝaj**, kvankam okaze de antaŭaj referendumoj estis necesaj nur 50 procento el la realaj voĉ-donantoj, ne ĉiuj proponitaj.

Tiu decido montris **la deziron de la hispana registaro ne agnoski** kompletan aŭtonomecon al Andaluzio. Ĉi tiu afero multe ĝenis andaluzojn, kiuj amase voĉdonis favore al kompleta aŭtonoma statuto.

Oni atingis sufiĉan plimulton laŭ la **listo de eblaj voĉ-donantoj** en ĉiuj provincoj, escepte en Almerio, tie oni atingis nur 42%. Post diskutoj inter politikaj partioj andaluzoj atingis kompletan aŭtonoman statuton kaj **speciala**

leĝo enirigis Almerion en tiun procezon. Fine, en la jaro 1981 oni aprobis aŭtonoman statuton por Andaluzio. La andaluzia popolo tion atingis dank'al tiu 28-a de februaro.

> La 28-an de februaro.

Recuerda que cuando se indica una fecha y delante de ella no aparece una preposición, la fecha debe ir en acusativo. Por ejemplo: “*Mi naskiĝis la 3-an de marto.*”

Cuando delante de la fecha se incluye una preposición, ej. *antaŭ / post*, entonces no usaremos el acusativo. Ejemplo: “*Mi ne loĝis en Malago antaŭ la 1-a de januaro*”.

> Temas pri...

Se traduce como «se trata de...». Puede usarse con un sujeto: “*La prelego temis pri historio de la flamenka arto*” (La conferencia trató del arte flamenco). También puede sobreentenderse el sujeto: “*Temas pri festo-tago*” (Se trata de un día de fiesta).

> Pleni / Pleniĝi je

Se traduce como «llenar / llenarse de». Podemos utilizar tanto la preposición *JE* como *DE*, ambas son correctas. Así, en esta frase también podría haberse dicho: “*...balkonoj kaj stratoj pleniĝas de andaluziaj flagoj.*”

> Estri

Podemos traducirlo como «mandar», «gobernar», «dirigir». Recuerda que los prefijos y los sufijos de la lengua esperanto pueden utilizarse de manera independiente. Es decir, el sufijo *-estr-* que significa «el que manda, el que gobierna, el que preside» y que se encuentra en palabras como *urbestro* (alcalde), *ŝtatestro* (jefe del estado), podemos también utilizarlo de manera autónoma. De este modo, *estro* sería jefe y *estri* mandar, actuar como jefe.

> Du milionoj da andaluzoj.

Lo hemos repetido ya en anteriores ocasiones, pero no viene mal insistir. Cuando hablamos de una cantidad: *cent, dek, kvin, multaj, kelkaj, iom...* usaremos la preposición *DA* para indicar la cantidad de cosas o sujetos a los que nos referimos. *Milionoj da andaluzoj, dekoj da amikoj, iom da pacienco...*

> La demando proponita estis ĉu oni deziris...

En español usamos «si» tanto para el condicional (*si yo fuera rico*), como para el dubitativo (*él no sabe si...*). En esperanto usamos conjunciones diferentes para cada uno de estos casos.

Cuando hablamos de una condición, usaremos *SE*: “*se mi estus riĉa mi aĉetus rapidan aŭtomobilon*” (si yo fuera rico compraría un automóvil veloz). Pero si hablamos de una duda, de una pregunta, usaremos *ĈU* “*mi ne scias ĉu mi devas aĉeti rapidan aŭtomobilon*” (no sé si comprar un automóvil rápido).

> 50% (procento) el...

Recuerda la preposición *EL*. La usamos para entresacar algo de un lugar. En este caso destacamos un grupo, un porcentaje del 50 %, de un total. Así que cuando hablamos de tantos por ciento usaremos *EL* para referirnos al grupo total.

> Pli ol 18-jaraĝaj

De más de 18 años.

> La deziro ne agnoski

“El deseo de no reconocer”. En español usaríamos la preposición «de» antes del infinitivo, en esperanto no es necesario colocar esa preposición.

> Listo de eblaj voĉ-donantoj

«Una lista de posibles votantes». Recordarás que hemos hablado de la preposición *DA*, la usamos cuando nos referimos a una cantidad de algo. En este caso “listo” (lista) no representa una cantidad, sino un grupo. Entonces usaremos *DE* y no *DA*.

Recuerda *DA* cuando hablamos de cantidad “*centoj da homoj*”; *DE* cuando nos referimos a la clase, a la categoría del grupo “*grupo de amikoj*”.

> speciala leĝo enirigis Almerion en tiun procezon

«Una ley especial incorporó a Almería en ese proceso». El verbo *enirigi* está formado por *EN+IR+IG+I*. Literalmente significa «hacer ir dentro», es decir introducir, incorporar. El lugar donde finaliza la acción «incorporar algo a algún

20 lugar» se indica con el acusativo de dirección: *en tiun procezon*.



NOVELO

La lasta peceto

Lukas Toczki

Nombraj kaj mirindaj estis ĉiuj laboraĵoj plenumitaj de la mozaikisto faritaj ĝis tiu tago de la maja kalendo. Infan-âge lin ravis la brilo de la blankaj ŝtonoj trovitaj apud la Tirena maro. Tiam li eltrovis, ke post unuigi tiujn blankajn kun aliaj nigraj elĵetitaj de la vulkano, li estis kapabla desegni tiel bele kiel aliaj infanoj faris per ties grifeloj sur tabuletoj. En la komenco li desegnis foli-abundajn palmojn, verŝajne li neniam vidis tian arbon, tamen nubia sklavo priskribis ĝin tiel detale, ke li kapablis desegni palmon per ŝtonetoj. Li imagis kiam Heraklo mortigis Gerionon, tiam ĉiuj surpriziĝis, ĉar li desegnis la musklojn de la taŭroj de la ido de Krisaro kaj la flugo de la sagilo kiu vundis la giganton. Li desegnis diojn, heroojn kaj ne-konatajn soldatojn. Ĉiuj miris je la suno brilanta sur la hararo en la bildoj, kvankam la flava astro ne aperis sur la mozaiko. Fine, se oni rigardis atente la laboraĵojn detale, ĉio estis nur peceto apud peceto.

Tiun tagon li komprenis, ke li troviĝis antaŭ sia lasta laboraĵo. Stranga hazardo, li ĉiam evitis bakĥnaliajn, orgiojn kaj festegojn, tamen li nun devis imagi paradon de la dio Bako kaj desegni per ŝtonetoj delirantajn dancistinojn, fortajn ĉevalojn trenantaj la ĉaron de la dio, plen-ĝojajn muzikistojn ludantaj fifrojn kaj ĉi ĉio ĉirkaŭigita de vin-beroj el kiu ŝprucis tiom da ĝojo.

Pasis tagoj kaj semajnoj kaj la mozaikisto finfine plenumis sian laboron, sian lastan laboraĵon. Li sciis, ke de post tiu momento la mozaiko utilis kiel ornamaĵo sur la planko de riĉa komercisto. Ĉi tiu, kvankam plebano, estus fiero pri tiu mozaiko ĉe la enirejo de domo tute simila al tiu de patricio. Pro tio la komercisto, tagon post tago, semajnon post semajno, urĝis la mozaikiston por pli rapide fini lian laboron, lian lastan laboraĵon.

Kiam la mozaiko plenumiĝis, la komercisto estis preta pagi la paktitajn denarojn, tamen, la mozaikisto malaperis. Ĉar li estis justa homo, li serĉis la artiston ĉiu-loke, en tavernoj, en la haveno, en ŝton-minoj. Neniu sukcesis diri al li, kie la mozaikisto troviĝas, simple li ne estis. La komercisto revenis hejmen, ververe feliĉa ĉar li ricevis belegan mozaikon kontraŭ neniom da mono. Tiam li eltrovis, ke la laboraĵo ankoraŭ ne estis tute finita. Mankis peceto por finiĝi ĝin kaj verdire temis pri manko okulfrape videbla. Tamen, tiu manko ne ĝenis lin, nur estus necese trovi taŭgan ŝtoneton simila laŭ koloro kaj mezuro. Li serĉadis alian similan, sed li ne sukcesis trovi tiun taŭgan peceton por finiĝi la mozaikon.



Ŝi konsideris tiun taskon kiel fortunan hazardon. Ŝia unua laboro kiel arkeologo celis plifirmigi kaj transporti unu el la plej belaj romiaj mozaikoj iufoje trovitaj kaj, eĉ pli feliĉe, ĝi estis tute kompleta. Do, ŝi metis tolon sur la mozaiko kaj post demeti la bazon, la tuta artaĵo, kiel bloko, detiriĝis. Ŝi miris je la granda laboro de la mozaikisto kaj je ties imag-povo kiel bild-komponisto.


Ĉirkaŭ centra ok-angulo, kie troviĝis la dio Bako sur ĉaro, aperis dancistinoj, muzikistoj, belaj virinoj kaj viroj kiuj, laŭ iliaj pozicioj, mienoj kaj eĉ vizaĝoj, montris kiaj feliĉaj estis la devotuloj de tiu dio.

Ŝi metis la tutan mozaikon sur tabulon kaj peceton post peceto ŝi purigis la tutan laboraĵon. La mozaiko ŝajnis perfekta, eĉ finita nur antaŭ kelkaj tagoj, kvankam ŝi datis tiun laboraĵon en la komenco de la 2-a jarcento post Kristo. Ŝi sentis plezuron dum la tasko, kvankam verdire temis nur pri la purigo de ŝtonetoj. Ŝi sentis sin rigardata, eĉ protektata, de Evroso, Boreo, Zefiro kaj Noto, la fidelaj gardistoj de tiu mozaiko dum tiom da jarcentoj.

Kiam ŝi finis la restaŭrado ŝi rimarkis malgrandan vakan lokon, tie mankis ŝtoneto. Ŝi serĉadis tra la tuta ĉambro kaj eĉ en la loko kie la mozaiko aperis, tamen neniu ŝtoneto simila laŭ koloro kaj mezuro alĝustigis en tiun lokon.

Lia vivo estis longa. Li ne kapablis memori kiom da mozaikoj li konstruis. Li diris, ke lia nomo iam estus memorata kiel la plej alt-kvalita mozaikisto de la Imperio, ke liaj laboraĵoj estus eternaj. Tamen, li ĉiam opiniis, ke lia laboro nur estis ŝteli al la tera patrino ties trezorojn kaj desegni per ili tion ŝongata dum-nokte.

Sian lastan mozaikon li tenis tiam en siaj manoj, sed li ne deziris fini ĝin. Li juĝis, ke ne povus esti pli valora la rezulto de la laboro ol la streboj por krei ion belan. Do, li decidis gardi por si mem la lastan peceton de la mozaiko. Ĝi taŭgus kiel mon-pago al Karono, ĉar eĉ ne la plej alt-taksata monero valoris tiom kiel la laboro de la mozaikisto dum lia tuta vivo.



Esperanto *Ponto inter popoloj*



Romia ponto en Kordovo



Inter montaroj, ĉe valo tra kie fluas la riveroj *Odiel* kaj *Tinto* troviĝas *Valverde del Camino*. Ekzistas arkeologiaj restaĵoj kiuj pruvas, ke romianoj jam ekspluatis min-resursojn en tiu zono, tamen oni konas neniun romian daŭran vilaĝon aŭ setlejon en la loko kie nuntempe troviĝas *Valverde del Camino*.

Verdire la vilaĝo naskiĝis post la starigo de farmo-domo ĉe trapasejo kiu situis apud vojo jam ekzistanta dum la Romia Imperio, do tiu domo utilis kiel trinkejo, manĝejo kaj gastejo por vojaĝantoj, komercistoj kaj kurieroj.

Blazono de Valverde del Camino



Tiu farmo-domo nomiĝis *Facanias*, vorto verŝajne devenanta el la araba lingvo. Tiel, kiam en la jaro 1369 aperas la fond-dokumento de la grafejo de *Niebla*, oni parolos pri loko nomita *Facanias*. Fine de la 15-a jarcento ĝi ŝanĝis sian nomon per *Valverde del Camino*, sendube tiu lasta vorto *Camino* rilatas al tiu antikva romia vojo. En tiu tempo oni parolis pri la tiea loĝado de 100 homoj, verdire familioj, pro la fakto, ke en tiu tempo oni kalkulis nur familiestrojn.

Ĝis la jaro 1732 *Valverde del Camino* estis plia kvartalo de la urbo *Niebla*, tamen en tiu jaro la reĝo Filipo la 5-a rajtigis la konstituon de *Valverde del Camino* kiel vilaĝon.

Dum la 19-a jarcento *Valverde del Camino* ĝuis fruktdonajn jarojn. Tiam multaj eksterlandanoj, ĉefe britoj, venis en la urbon altiritaj de la kompanioj kiuj ekspluatis la mineralajn resursojn dum la 19-a jarcento. Dum tiuj jaroj la brita kompanio starigis konstruaĵojn tipe britaj, kiel la stacidomo, la centraj oficejoj de la brita kompanio.

Krom la minejoj la ellaborado de botoj per alt-kvalita ledaro estis la ĉefa industrio en *Valverde del Camino* kaj

ankoraŭ nuntempe la urbo estas konata en la tuta Hispanio kaj eĉ eksterlande pro tiu agado.

Monumentoj

Dolmenoj “Los Gabrieles”

En la jaro 1966 oni eltrovis sep dolmenojn sufiĉe bone konservitaj. Laŭ esploroj ne ĉiuj ili datiĝas de la sama tempo, kvankam ili proksimume stariĝis ĉirkaŭ la 3-a jarcento p.K.



Domo de la Direktoro

Kiel dirite, la brita kompanio kiu ekspluatis apudajn minejojn starigis tipe britajn konstruaĵojn en *Valverde del Camino*. Unu el ili estis la domo kie loĝis la direktoro de la kompanio, tio estas *The General Manager*.

La konstruaĵo havas tri etaĝojn kaj apud ĝi troviĝas belega ĝardeno kun pin-arboj, palmoj kaj malgranda korto.



Preĝejo de la Madono de Reposo

La konstruaĵo ekiĝis fine de la 16-a jarcento kaj finiĝis komence de la 17-a. La aŭtoro de la ĉefa altaro estis la flandra pentristo *Pablo Legotel*. La preĝejo multe damaĝis okaze de la tertremo de Lisbono en la jaro 1755 kaj tiam ĝi estis rekonstruita de la arkitekto *Tomás Botani*.



Festoj

Festo de Sankta Ana

Duone kultura kaj religia festo. En la jaro 1947 malgranda grupo de *valverde*-anoj ekigis feston ene de sia propra kvartalo. Depost kelkaj jaroj ĝi fariĝis la ĉefa festo dum la somera sezono.

Karnavalo

Temas pri kutima karnavala festo organizita laŭ la stilo de la provinco Kadizo, tio estas, malgrandaj grupoj renkontiĝas por kanti mokeme pri aktualaj aferoj.

Gastronomio

La onuba montaro kie troviĝas *Valverde del Camino* estas zono plena je fungoj, do, ili estas la bazo de kelkaj tipaj manĝaĵoj, kiel la fazeola stufaĵo kun fungoj. Bongusta ankaŭ estas “*salmoreho* kun oranĝo kaj *boga*” (*boga* estas malgranda fiŝo en la familio sparedoj). Kvankam la nomo “*salmoreho*” memorigas iaspecan gazpaĉon, reale temas pri fiŝaĵo akompanita de legomoj kaj oranĝo.

La plej tipa deserto sendube estas la *poleá*. Iaspeca farunaĵo kun cinamo.






Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

La rakontinda historio de la Pastro Félix

La plej grava riĉeco de nia movado estas la diverseco de homoj kiuj, nun aŭ iam, parolis speranton. Ĉirkaŭ ni, estas eble trovi homojn sagacajn kaj naivajn, klerajn kaj mallertajn, sanktajn kaj perfidajn, poetojn kaj negocistojn... ĉiuj estas bovenaj kaj pri ĉiuj ili ekzistas io rakontinda.

Unu el tiuj homoj, kiu dum jaroj agadis en nia movado kaj flue parolis la internacian lingvon, estis ĉefrolulo de historio kiu indas esti rakontata: la rakontinda historio de la Pastro *Félix*.



**Pastro Félix de Valois Arana
en la jaro 1951**

Félix de Valois Arana Arenal naskiĝis en *Burgos* en la jaro 1923 ĉe tradicia familio. Li estis malproksima parenco de la vaska naciisto *Sabino Arana* kaj en lia abunda frataro troviĝis

militisto kiu luktis en la frankisma “Blua Divizio”, pastro kaj monaĥino. Li mem studis en la Seminario de la Klareta Ordino en *Santo Domingo de la Calzada*, tie li fariĝis katolika sacerdoto en la jaro 1949.



La hispana kolonio en Gvineo estis ofta celo de multaj katolikaj pastroj, inter ili ankaŭ la Pastro *Félix de Valois Arana*, la dua sidita dekstren.


Tuj li marŝis kiel misiisto en Ekvatoran Gvineon, en tiuj jaroj tiu afrika teritorio estis hispana kolonio kaj ankaŭ la celo de novaj pastroj dezirantaj disvastigi siajn religiajn kredojn kaj bapti kiel eble plej grandan nombron de indiĝenoj. Félix estis klera homo, li parolis kelkajn lingvojn, ankaŭ esperanton, kvankam mi ne trovis konitaĵojn pri kiumomente li lernis la zamenhofan lingvon. Li verdire regis tre bone nian internacian idiomon.

Félix Arana, kvankam tiutempe li uzis sian kompletan nomon, tio estas "*Félix de Valois Arana*", enmiksiĝis en la kulturan vivon de la kolonio, tiel, post kelkaj jaroj en Gvineo, li fariĝis direktoro de la kultura revuo de la teritorio "*La Guinea Española*", krome, li estis ofta preleganto okaze de konferencoj organizataj de la hispana registaro, ekzemple en la jaro 1951 li prelegis pri "Psikologio de la Nigra Popolo", li ankaŭ lernis la fangan (gvinean) lingvon, kun la celo alproksimiĝi al la kulturo de la teritorio.

En tiu jaro li ankaŭ estis profesoro en la Supera Indiĝena Kolegio kaj en la Katolika Seminario de Banapá, tuj apud la ĉefurbo de la hispana kolonio Fernandopoo. Tie, *Félix de Valois Arana* ne nur disvastigis la katolikan kredon, sed ankaŭ la internacian lingvon. Li organizis esperanto-kursojn en la Pastra Lernejo de *Banapá* kaj li eĉ kreis malgrandan grupeton de gvineaj esperantistoj kun 40 lernantoj, li revis pri la onta fondiĝo de esperantista gvinea asocio. Unu el tiuj lernantoj, *Cirilo Mba Obama*, poste estis unu el la ĉefaj reprezentantoj de la politika partio MUNGE (*Movimiento de Unión Nacional de Guinea Ecuatorial* – Movado por la Nacia Unuiĝo de Ekvatora Gvineo) okaze de la sendependiĝo de la kolonio en la jaro 1968.

Cele al la disvastigo de Esperanto en Ekvatora Gvineo, li ricevis oftajn helpojn de la Hispana Esperanto-

Federacio kaj eĉ de eksterlandaj samideanoj, kiuj havigis al li libro-metodojn kaj abonojn al E-revuo. Kontraŭe estis oftaj liaj mondonacoj, eĉ malgrandaj, al la hispana E-movado. La allogeco de nia ĉefrolulo estis okulfrapa, li estis alta, tre kulturema kaj simpata, okaze de parolado kun tiama enloĝantino de la hispana kolonio, ŝi konfesis al mi, ke preskaŭ ĉiuj eŭropaj virinoj en la tiama gvinea ĉefurbo sekrete enamiĝis al li, malgraŭ la pastra fraŭleco de nia ĉefrolulo.



Fotografajo sendita de la Pastro *Félix de Valois Arana* kun teksto en esperanto. Ĝi aperis sur la revuo *BOLETÍN* de Hispana Esperanto-Federacio

Dum tiuj jaroj, malofte *Félix de Valois Arana* povis reveni en Hispanion, sed kiam li sukcesis fari tion, li sendube partoprenis en esperanto-kongresoj kaj -renkontiĝoj.

En la jaro 1954 li ĉeestis la hispanan kongreson de Esperanto, okazigita tiujare en Zaragozo, tie li partoprenis apud gvinea juna esperanto-studento *Manuel Enguema*. Inter la aktoj de li okazigitaj dum la Kongreso estis la religia di-servo al la kongresanaro, kiu okazis en esperanto.

Ankaŭ en 1954 finiĝis la aventura misio de *Félix de Valois Arana* en Afriko. Tiam, la Klareta Ordino revenigis lin en Hispanio, ĝuste en la kantabran vilaĝon *Castro Urdiales*. Tie li laboris kiel profesoro en lernejo kaj religia predikisto en sia religia ordino.



Pastro *Félix Arana* kaj esperantisto de Gvineo, S-ro *Manuel Enguema*, okaze de la Hispana Kongreso de Esperanto en Zaragozo - 1954

Dum tiuj jaroj li ankaŭ kunlaboris en la disvastigo de Esperanto, li prelegis okaze de la fondiĝo en la jaro 1954 de la Santandera Esperanto-Grupo. En la jaro 1956 li suferis personan krizon, li mem asertis, ke li ne estis jam “ekzemplo-dona” sacerdoto kapabla helpi la ceterulojn, do, li petis forpermeson al la katolikaj aŭtoritatoj por ĉesi sian agadon kiel pastron.

Dum pliaj sep jaroj li estis profesoro pri lingvoj en *Aranjuez* (Madrido) kaj poste li iris en Barcelonon, por estri prestiĝan germanan turism-agentejon, sendube lia lingvo-kono helpis lin profesie. Ne ekzistas dum tiuj jaroj pruvoj pri la ebla esperanto-agado de *Félix Arana*, tamen de tempo al tempo li kunlaboris pere de mond-donacoj al Hispana Esperanto-Federacio. Tutcerte dum tiuj jaroj, 1960-aj, li ne sin dediĉis al religiaj aferoj, li eĉ deklaris, ke li ne vizitis preĝejojn, kvankam li estis homo kun religiaj inklinoj.

Okazis en la jaro 1968, ke kvar infanoj asertis, ke la *Virgulino Maria* aperis antaŭ ili en malgranda vilaĝo de la sevila provinco: *El Palmar de Troya*. Poste, aliaj enloĝantoj en tiu sama urbeto tion certigis kaj virino eĉ asertis travivi mistikan sperton en tiu loko. Komence de la 7-a jardeko oni diris, ke la tiea akvo estis kapabla plenumi miraklojn, do, multaj pligrimantoj ekiris en *El Palmar de Troya*, tuj apud la urbo *Utrera*.

Baldaŭ la nomo de la vilaĝeto disvastiĝis unue tra Hispanio kaj poste tra la tuta mondo, la mond-donacoj de piuloj kredantaj je tiuj mirakloj ekvenis en tiun trankvilan terkulturan vilaĝon.



Impona preĝejo starigita de la fideluloj de la sekto de *El Palmar de Troya* en tiu vilaĝo de la provinco Seviljo

La Roma katolika eklezio sendis tien al vjetnama ĉefepiskopo por pristudi la aferon. *Pierre Martin Ngô-Dinh-Thuc* ne nur informis pri la afero al la Papo Paŭlo la 6-a, sed li ankaŭ revenis tien kiel fervora pilgrimanto kaj li eĉ ordinis episkopojn, inter ili kelkaj jam katolikaj pastroj kaj aliaj homoj kiuj iris en *El Palmar de Troya*, altiritaj de la mond-donacoj. Tiuj novaj episkopoj poste ordinis dekojn da novaj pastroj kaj monaĥinoj.


Komence de la jaro 1976, Felix Arana profitis feriajn tagojn por viziti *El Palmar de Troya* kaj tiel, koni rekte tiujn religiajn okazintaĵojn. Dum la vizito io eksterordinara okazis, grupo de ok homoj, inter kiuj troviĝis *Félix Arana*, ĉeestis ekstazon de religia vidanto, li susure sciigis, ke en tiu

grupeto troviĝis pastro, la manoj de la vidanto donis kelkajn religiajn objektojn al *Félix Arana*, tamen li neniam sciigis tie pri sia eks-pastra kondiĉo.

Laŭ *Félix Arana* poste diris, li travivis sensacon tute ne-esprimeblan. Poste, alia stranga afero okazis, laŭ alia vidanto, la Virgulino deziris la ĉeeston en tiu loko de la Pastro *Félix*. Tiam li decidis esti denove pastro preta helpi la ceterulojn kaj pro tio li restis en *El Palmar de Troya*.

En la monato februaro 1976 oni nomumis al *Félix Arana* episkopon en *El Palmar de Troya* tamen li baldaŭ apartigis sin de la plej grava reprezentanto de tiu religia grupo: *Clemente Domínguez*. *Félix Arana* sekvis dum sia juneco teologiajn studojn, tamen *Clemente*, poste proklamita papo de tiu sekto (Gregorio la 17-a), estis nur oficisto kiu alvenis en *El Palmar de Troya* altirita de la grandaj mond-donacoj ricevitaj ĉefe

de dekstremaj usonanoj. Tiel, en la monato aprilo 1976 *Félix Arana* deklaris, ke la instruado de *Clemente Domínguez* estis tute kontraŭa al tiuj de la katolika eklezio, li eĉ verkis libreton sub la titolo “Perfido en El Palmar de Troya”. Multaj eksaj sekvantoj de *Clemente Domínguez* renkontiĝis tiam ĉirkaŭ la Pastro *Félix Arana* kaj ili je kelkaj metroj de la impona katedralo de *El Palmar de Troya* starigis blankan grandan krucon, ekde tiam la movado de la Pastro *Félix* en *El Palmar de Troya* estas konata kiel “La Blanka Kruco”.



Pastro *Félix Arana* en la jaro 1991

Siafoje, tiu grupo de *Clemente Domínguez*, kiu unuamomente nur sopiris esti plia katolika ordino, rompis rilatojn kun la roma eklezio kiam oni elektis *Clemente* kiel novan papon kun la nomo “Gregorio la 17-a”. Tio jam estis definitiva paŝo por la retiriĝo de la Pastro *Félix Arana* de la sekvantoj de *El Palmar de Troya*, ĉar Arana neniam deziris rompi kun la roma eklezio.



Blanka kruco starigita de la sekvantaro de la Pastro *Félix* en *El Palmar de Troya*.

La Blanka Kruco kaj la Pastro *Félix* deklaris sin anoj de la roma katolika eklezio, la fotografajoj de la romaj papoj prezidis ankaŭ la kunvenojn de tiu religia grupeto. Verdire *Félix Arana* estis tre tradicia kaj li uzis la latinan lingvon okaze de la mesoj de li prezidataj, tamen li neniam deziris krei novan religion kontraŭe al tiuj de la sekvantoj de *Clemente Domínguez*, kiuj fondis la “Katolikan Palmaran Eklezion”.

Ekde tiam *Félix Arana* instigis komunajn preĝadojn ĉiusabate al kiuj ĉeestis ankaŭ vidantoj kiuj, post ekstazoj, sciigis pri diaj deziroj por la mondo. La eldiraĵojn de la vidantoj surbendigis *Félix Arana* kiu poste transskribis ilin por ĝenerala disvastigado.

Tamen por li mem li gardis tiujn diajn mesaĝojn senditaj nur por la Pastro *Félix Arana* kiujn li prinotis atente kaj poste legis en lingvo nur uzata tie de li, en esperanto. Do, nia kara lingvo neniam restis forgesata de la pastro *Félix Arana*.


En la jaro 2005 la Pastro *Félix Arana* forpasis, li ricevis katolikan entombigon kaj funebran ceremonion en *Utrera* (Sevilo).

J.M.R.H.



Historia Arĥivo de
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Apartado de Correos 611
E-14080 Córdoba (Hispanio)
cordoba@esperanto.ac





$E = mc^2$ *Scienca Angulo*

La Oliv-oleo

Ĝi estas konata kiel “*verda oro*”, temas pri la suko de la olivoj, pri kio Andaluzio produktis pasint-jare 1.348.000 tunojn, preskaŭ la duono el la tuta oliv-oleo produktita en la mondo. Sed ne ekzistas ununura oliv-oleo, sendube la plej uzata estas tiu virga unuakvalita oliv-oleo, do, ni konu kiom da klasoj de oliv-oleo ekzistas en la merkatoj.



Oliv-oleo, *la verda oro*.

Unuakvalita Virga Oliv-Oleo, en la hispana lingvo oni uzas la mallongigon AOVE (*Aceite de Oliva Virgen Extra*). Temas pri oleo rekte elpremita de la oliva frukto nur pere de mekanikaj procedoj. Oni rikoltas la olivojn ĝuste dum la plej taŭga epoko de maturiĝo de la frukto. Krome, nur estas uzataj por produkti ĉi tiun oleon tiuj olivoj kiuj estas rikoltitaj rekte el la arbo, neniam tiuj kiuj faliĝis antaŭ

la rikoltado. Alia karakterizaĵo de la unuakvalita virga oliv-oleo baziĝas sur la acideco de la frukto. La kvanto da grasaj acidaj ne povas esti pli alta ol 0,8 gramoj rilate 100 gramojn de oliv-oleo. Ĉi tiu unuakvalita virga oliv-oleo estas uzata ĉefe por salatoj kaj fritajoj.

Virga Oliv-oleo (*Aceite de Oliva Virgen*) temas ankaŭ pri suko de olivoj rekte premita el la oliv-arbo, tamen la grasaj acidaj troviĝantaj ene de 100 gramoj de oleo povas esti pli alta ol 2 gramoj. Ofte ne estas facile distingi ĉi tiun virgan oliv-oleon de tiu unuakvalita virga, cele al tiu estus necese ĥemian analizon.

Oliv-oleo (sen pliaj adjektivoj). Se ene de la etikedo de la botelo enhavanta oliv-oleon, ne aperas la vortoj *virga* aŭ *unuakvalita virga*, la aĉetanto de tiu produkto troviĝas antaŭ oleo ankaŭ elpremita de olivoj, tamen tiuj olivoj povus troviĝi surtere antaŭ la rikoltado aŭ difektita pro prujno antaŭ ties rikoltado. Sciu, ke la rikoltado okazas dum la monatoj decembro kaj januaro, kaj

en tiuj monatoj en Andaluzio ofte malvarmiĝas. Por elpremi la oleon el la olivoj oni uzas ne nur premadon, sed ankaŭ ĥemiajn kaj termikajn procedoj.



Azuleño montranta la tradicion rikoltadon de olivoj, piede de oliv-arbo.

Oliv-rekremento (*Aceite de orujo*). Temas pri oliv-oleo malaltkvalita. La suko estas elpremita de olivoj muelitaj kaj jam antaŭe premitaj. Por atingi tiun oleon estas necese uzi ĥemiaĵojn, do la oleo ne estas altkvalita.

La acideco de ĉi tiu oleo estas pli alta ol 2 gramoj. Ĝi estas facile distingebla de aliaj pli kvalitaj oleoj, pro la malbonaodoro, krome la koloro ne estas tiel pura kiel tiuj de virgaj oliv-oleoj.

Las líneas de trabajo de la Asociación Andaluza de Esperanto son dos:

- *Difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía.*
- *Dar a conocer la cultura andaluza en todo el mundo por medio de la lengua esperanto.*

¿Te sientes identificado con estas ideas?

¿Quieres colaborar en su desarrollo?

No lo dudes, hazte socio de la Asociación Andaluza de Esperanto.

(Más información en la página 8)



Flamenko

La Petenero

La petenero estas branĉo de la flamenka kantado. Kutime temas pri trista kaj melankolia vortumado, ludita per malrapida kaj sentimentala kantomaniero, eĉ oni asertas, superstiĉe, ke ĉi tiu kantado provokis malbonaĵojn al kantistoj.

Pri la origino de ĉi tiu branĉo de la flamenko, oni asertas, ke ĝi havas judan devenon:

*Tra la stratoj de Judeo
tra la stratoj de Judeo,
virino plorante iras.
Devenas ŝi de Sefardi',
kompantinda estu ŝi.
Devenas ŝi de Sefardi',
ŝi ankoraŭ memoras ĝin,
ŝi ankoraŭ memoras ĝin.
Do, ŝi ne povas forgesi ĝin.*

Do, ĉi tiu kantaĵo estis kvazaŭ romanco de la juda popolo kiu estis elpelita de Hispanio en la jaro 1492, tio estas la sefardoj. Ili daŭre konservis hispanajn kutimojn kaj eĉ la lingvon.

Priesploristoj asertas, ke ĉi tiu romanco iris en Amerikon, ĝuste en Meksikion, kaj tie ĝi kunfandiĝis kun kantaĵoj kaj dancaĵoj tipaj de la regiono *Veracruz*, la *haroĉo*. Tiam naskiĝis la amerika petenero.

Inter la jaroj 1820 kaj 1826 ĉi tiu kantaĵo revenis en Hispanion tra la haveno de la urbo Kadizo, kaj de tie ĝi eniris en la flamenkan arton.

Rilate la nomon, ĝi devenas de la kantistino "La Petenera", kiu naskiĝis en la kadiza vilaĝo *Paterna de la Rivera* fine de la 18-a jarcento.

Grandaj aŭtoroj verkis pri ĝi, tiel *Gráfico de la Petenera*, ene de la libro *Poema del Cante Jondo*, kies aŭtoro estis la granda poeto Federico García Lorca. Li pianludis la poemon akompanita de la dancistino "La Argentinita":

*La gitaro,
plorigas triste la sonĝojn.
Plor-ĝemoj de perditaj
animoj,
forkuras el ĝia buŝo
ronda.
Kaj kvazaŭ tarantulo
ĝi teksas grandan stelon
por ĉasi sopirojn,
ŝvebantaj en la nigra
puto el ligno.*

Nuntempe oni parolas pri tri tipoj de peteneroj: tiu antikva, tiu moderna kaj tiu mallonga. Nur ĉi tiu lasta estas akompanita de dancado.

Ĉi tiu danco estis tre ofta fine de la 19-a jarcento kaj laŭdire, temas pri unu el la plej antikvaj flamenkaj danc-stiloj.

Jen kelkaj peteneroj, ĉi tiu unua havas judan devenon:

*Venu tuj, riparistino,
riparu jam miajn dolorojn,
afliktas mian tutan korpon
malsanoj de amoroj.*

*Kien vi iras, bela judino,
foriris jam la sun'.
Mi serĉas mian edzon,
li en la sinagogo preĝas nun.*

*Apud sen-frukta arbo
mi ĉi tion konsideras,
malmultajn amikojn havas
tiu, kiu neniom posedas.*

Kaj fine, jen mallonga petenero kantita de *Antonio Chacón* (1869-1929):

*Mi vidis infanon plorantan
ĉe sankta tombejo.
Ĝemante li ekkriis:
"Mia kara patrin',
mi plor-preĝas por vi.
Kia dolor' kara patrin'!"*



En *Paterna de la Rivera* (Kadizo) ĉiujare okazas prestiĝa festivalo por diskonigi petenerojn.

Fervojista Angulo

Fervojoj en la onubaj minejoj



En la jaro 1873 la registaro de la ĵus naskita Hispana Respubliko bezonis urĝe mon-rimedojn kaj sendube, la mineralajn resursoj troviĝantaj en Hispanio estis taŭga maniero atingi tiun urĝan monon. Tiam la hispana registaro decidis vendi per publika konkuro la ekspluatadon de unu el la plej gravaj kaj fruktodonaj minejoj en Hispanio, tiuj de la provinco Onubo. Tie oni eltiris, ĉefe kupron, arĝenton kaj oron.

zono fariĝis laŭ aserto de historiisto la plej granda mineja zono en la mondo.

La minejoj troviĝis je 70 kilometroj de la marbordo kaj sciate, ke la fina celo de tiu mineraloj estis la britaj fabrikoj, do estis necese transporti ilin de Onubo en Brition per ŝipoj. Pro tio, estis nepre konstrui fervojan linion por transporti la mineralojn. Tio okazis inter la jaroj 1873 kaj 1875 kiam la brita kopanio konstruis la plej gravan



Britaj investantoj oferis al la hispana registaro 94 milionojn da pesetoj por aĉeti tiujn minojn. Tiu grandega mon-kvanto evitis la bankroton de la hispana respubliko. Fondiĝis tiam la brita kompanio *Riotinto Company Limited*, kiu ekspluatadis tiujn minojn inter la jaroj 1874 kaj 1954 kaj tiu

ministan fervojon en Hispanio kiu funkciis ĝis la jaro 1984.

La inĝeniero kiu dezajnis la fervojlinion estis la brita *George Barclay Bruce*, respondeculo ankaŭ de la mineral-kajo en la onuba haveno. Oficiale la fervojon oni inaŭguris en julio de 1875 kaj nur unu monato

poste ĝi jam plene funkciis. Verdire temis pri nepra kaj urĝa fervoja linio, ĉar la kompanio deziris transporti la mineralon kiel eble plej rapide. Kurioze la kosto de la fervojo estis malpli granda ol tiu unue buĝetita. La linio estis 1067 mm laŭ-larĝe, konata kiel Kaba Mezuro, ĉar ĝi estis uzata en la brita kolonio de Kablando.



Laŭlonge la fervoj-lineo trakuris 83 kilometrojn kun 12 stacidomoj, al kiuj poste aldonis novaj deriv-linioj. Fine la tuta linio iris tra 360 km. Unu el la plej allogaj aferoj de ĉi tiu linio estis la fakto ke ĝi iris laŭlonge de la rivero *Tinto*, kun pejzaĝoj ruĝ-koloraj, pro la abundo de kupro en la montaro. La apudeco de la rivero kaj la montaro devigis konstrui 8 pontojn kaj 5 tunelojn.

Ĉiujare tra la fervoja linio kuris 1.200.000 tunojn da mineralo, tio estas 10.000 tunojn po tage, tiel estis nepre uzi 1.300 vagonojn en tiu transportado.

Baldaŭ la kompanio inaŭguris servon ne nur por transporti mineralojn sed ankaŭ pasaĝerojn kaj tiu fervoja linio ebligis komuniki la onuban provincon kun la cetera Andaluzio kaj Ekstremaduro. Tiel, ĝis la jaro 1900 oni kalkulas, ke uzis tiun linion pli ol unu milionoj da vojaĝantoj, multaj el ili laboristoj de la minejoj.

Rilate la lokomotivojn oni uzis 150 el ili, 143 vaporfortaj kaj 7 elektraj. La fervoja linio funkciis regule ĝis la jaro 1954 kiam la brita kompanio ĉesis la ekspluatadon de la minejoj kaj revenis en la hispanan administracion. Post tiam la mineralo jam ne iris en Brition, sed al la industrioj en la urbo Onubo kaj tiel iom post iom oni anstataŭis la trajnojn per kamionoj. La linio fermiĝis en la jaro 1984. Laŭ kalkuloj faritaj, tra la fervoja linio iris dum ties ekzisto 130 tunoj da mineralo.

En la jaro 1992 oni decidis ekfunkciigi denove la fervojan linion, sed ĉi-foje nur kiel turisma allogaĵo. Ekde tiam estas eble viziti muzeon, lokojn kaj eĉ antikvan minejon kie oni montras antikvan ministan ilaron. Kompreneble ankaŭ estas eble vojaĝi per tiu trajno de la 19-a jarcento. Sendube tiu vizito kaj veturado sur tiu antikva trajno estus alloga agado de la fervojista E-amikaro kiam la sanizoligo finiĝos. Ĉu vi estas preta aliĝi al tiu agado?

Hispana Amikaro de Fervojistoj
Esperantistaj

fervojista@esperanto.ac



Andaluza Kuirarto

Artiŝokoj kun haketita viando

Artiŝoko estas specio de cinaro el la familio de asteracoj. Ties nematuraj floroj estas uzataj kiel legomoj. La karneca malsupra parto de la floro estas manĝebla.

En Andaluzio ni uzas malsimilan vorton laŭ la grandeco de la artiŝoko. Tiel ni diras “*alcaucil*” (prononcu: alkaŭsil’), se temas pri granda artiŝoko taŭga por kuirado, kaj “*alcachofa*” (prononcu: alkaĉofa), se ni parolas pri legomo taŭga por salato aŭ por enladigo. Ambaŭ vortoj devenas el la araba lingvo, “*al-kharshuf*” (bastono kun dornoj) kaj “*alcaucil*”, vere de la andaluza lingvo parolata dum la Mez-epoko de la popolo. Ĝi estas miksaĵo inter la araba artikolo “*al*” kaj la mozaraba “*kabisi*” (malgranda kapo).

Temas pri legomo tre ofta en la andaluza kuirado. Ĉi-numere ni prezentas recepton de **artiŝokoj kun haketita viando el bovo**.

Ingredientoj:

- 8 artiŝokoj.
- Haketita viando (300 gramoj) prefere el bovo.
- 4 ajletoj.
- 1 cepo.
- 1 ovo.
- Haketita pano.
- Faruno.
- 1 karoto.
- ½ ruĝa kapsiko.
- 2 terpomoj.
- Citrono.
- Salo.
- Papriko.
- Petroselo.
- Oliv-oleo.



Jen la ellaborado:

1. Purigu tre bone la artiŝokojn. Tio estas: demetu la eksterajn foliojn kaj la malgrandan lanugaron kreskanta ene de ĝi. Frotu citronon tra la tutaj artiŝokoj por eviti la nigriĝon de tiu legomo. Enmetu la artiŝokojn en poton kun akvo kaj citrono.

2. Miksu la haketitan viandon kun la ajleroj kaj la petroselo, ambaŭ tre bone distranĉitaj en pecojn. Aldonu ankaŭ la haketitan panon, paprikon, salon kaj la ovon batitan. Se vi deziras vi povas aldoni ankaŭ sinkon, en malgrandaj pecetoj.

3. Prenu la artiŝokojn. Ene de ĉiu artiŝoko metu tiun antaŭan miksaĵon. Enpremu forte la miksaĵon en la artiŝokojn.

4. Enmetu la supran parton de la artiŝokoj unue en la ovon batitan, poste en la farunon.

5. Fritu la artiŝokojn. La supra parto de la artiŝoko, la loko kie estas plenumita de la miksaĵo, devas esti en rekta kontakto kun la plato kaj la oleo, tiel la miksaĵo pli bone fermiĝos.

6. Ene de kaserolo ni metas la frititajn artiŝokojn. Aldonu tranĉitajn terpomojn, cepon (ankaŭ distranĉita), karoton, laŭron, petroselon, citronan sukon, iomete da oliv-oleo kaj akvo. La akvo devas kovri la tutajon en la kaserolo.

7. Aldonu poste salon kaj paprikon.

8. Kuiru ĉion dum 20 minutoj, pli malpli. La akvo devas malaperi kaj aperi densa saŭco. Se necese, por densigi plie la saŭcon, aldonu haketitan panon.

VORTARO DE LA RECEPTO



Artiŝoko



Ajlo



Cepo



Ovo



Haketita pano



Faruno



Salo



Papriko



Karoto



Ruĝa kapsiko



Terpomo



Citrono



Petroselo



Oliv-oleo



La Filinoj de la Reĝo Abib

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

Kiam Sankta Fernando antaŭeniris tra la belegaj andaluziaj teroj, la reĝo Abib estis seniigitaj je sia propra reĝlando, do, li devis forkuri al la magia urbo (kaj tiama regno): Granada.

Li luis palacon kaj en ĝi kaŝis siajn trezorojn. Li, tamen, senĉese ploris pro la perdado de sia regno kaj nur lin konsolis liaj amataj filinoj, tri belegaj junulinoj, kies haŭto estis tiel blanka kiel la neĝo de la montaro Sierra Nevada.

La filinoj neniam eliris el la palaco, konsekvence ili ne renkontis ajnan junulon. Tamen, la tempo pasis kaj la patro fine decidis edzigi ilin kun tri magnatoj de la kortego de Granada.

Sed iun vesperon la junulinoj aŭdis kelkajn harmoniajn voĉojn. Tiaj voĉoj diradis, ke la filinoj neniam fine edziniĝos kun la magnatoj. Mistere, la voĉoj silentiĝis kaj en la sinoj de la filinoj aperis tri belformaj ringoj. Ekde tiam ŝiajn kapojn plenigis la scivolemo pri tiaj voĉoj.

Iun tagon okazis la okazendaĵo: la posedantoj de tiaj voĉoj ekaperis

antaŭ ili: estis tri ĉarmaj junuloj, kiu lukse vestis sin.

Senparoligitaj pro la allogo de tiaj viroj, la adoleskantinoj stariĝis kaj subite vidis, ke la junuloj havis samformajn ringojn kiel tiuj, kiujn la filinoj de la reĝo ricevis.

Unue, junulo alproksimiĝis al la plej eta kaj ravis ŝin per siaj diraĵoj: li sendube volis edziniĝi kun ŝi. Li krome diris, ke li estas la feo de la akvoj. La junulino, kvazaŭ sorĉita de iu nekonata forto, akceptis la proponon.

Poste, alia junulo alproksimiĝis al alia junulino. Same kiel antaŭe okazis, li proponis al ŝi geedziĝon kaj ŝi senhezite akceptis. Li estas la feo de la aeroj.

Fine, la lasta junulo alproksimiĝis al la lasta junulino. Ankaŭ ŝi akceptis edziniĝi kun li. Li estas la feo de la ĝardenoj.

Kiam la reĝidinoj akceptis la proponojn, la feoj donis al siaj respektivaj ontaj edzinoj stelojn por ke ĉi tiu gvidu la junulinojn en ŝiaj vivoj.

Tamen, la muroj havas orelojn: la reĝo Abib sciigis pri ĉi tiaj okazintaĵoj kaj li igis priserĉi la tutan palacon al siaj servantoj, sed ĉio estis tute senutila: nenie troviĝis ŝiaj agrablaj filinoj.

Ankaŭ la homoj de Granado sciigis pri la malapero de la filinoj de la reĝo Abib, tamen ili tute ne kredis, ke la kaptintoj estas feoj, sed kristanaj militistoj, kiuj povis facile eskapi de la palaco.

Jarcentoj pasis kaj pasadis. Unu tagon riĉeta viro kaj lia familio ekloĝis en tiu sama palaco, en kiu loĝis la reĝo Abib kaj ties filinoj. Venis al liaj oreloj la legendo pri la trezoroj de la reĝo kaj ekde tiam li priserĉadis la tutan konstruaĵon senĉese. Bedaŭrinde, li ne sukcesis, do, li vendis sian propran animon al la diablo por trovi ion valoran en la palaco.

Fine li ja trovis ion: estis kofro plenplena je oraj moneroj. Lia ĝojo estis senlima; li iĝis unu el la plej riĉaj homoj de la urbo. Tamen, la familio rimarkis, ke la karaktero de la viro ŝanĝiĝis.

Jaro pasis kaj la Kristnaska Antaŭtago alvenis. Tiam la viro ŝajnis pli kontenta ol antaŭe pro tio, ke li vidis, ke la diablo ne venis por likvidi la ŝuldon. Nokte, li eliris el sia ĉambro kaj alproksimiĝis al sia familio.

Li ĝoje drinkis vinon, sed subite li palidiĝis. Kun la timo premante lian koron, li retroiris ĝis la muro.

Li ĵus vidis la diablon! La diablo petis de li lian animon por likvidi la ŝuldon pro la donita helpo. La familio, tamen, nenion vidis, do, nenion komprenis.



Tamen, senaverte la homo falis al la planko mortinta kaj tuj poste io mistera malkombinis lian korpon. Oni diradis, ke li simple mortiĝis pro troa drinkado de vino.

La familio decidis enterigi lin kiel eble plej baldaŭ kaj kiam ili alvenis en la tombejo, ili vidis, ke la ĉerko estas malplena...

Fonto de la fotografio: <https://mallonge.net/a1>

La teksto en la originala hispana troviĝas en la libro *Leyendas de Andalucía*, de la eldonejo Editorial Labor (1984).

Tradukis el la hispana: *Alejandro Burgos Escalante*.

Retpoŝtadreso:
alejandroburosescalanteabe@gmail.com



*Ĉu la revuo plaĉas al Vi?
Ĉu io aldonebla?*

*Ĉu Vi deziras ŝanĝi ion?
Ĉu forviŝebla?*


Gazeto Andaluzio estas malfermita revuo al ĉiuj legantoj.
Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:

cordoba@esperanto.ac




Kaj kompreneble... ne hezitu sendi viajn kunlaboraĵojn !

Vorto-Ludoj



Krucvorto



HORIZONTALALE


- A. Fikcia loĝanto de planedo ne tre malproksima al la Tero.
- B. (Sen la lasta vokalo) grupode grandaj Amerikaj papagoj kun plumoj okulfrape koloraj. ■ (Sen la lasta vokalo) kamparo.
- C. Alkonduki al malpli grandaj proporcioj.
- Ĉ. Vokalo. ■ Rilata al havigo de kora inklino al iu. ■ Konsonanto.
- D. Parole aŭ skribe sciigi okazaĵon kun ĝiaj cirkonstancoj.
- E. Interjekcio uzata por aprobi kantiston kaj peti, ke li/ŝi ripetu brilan pecon. ■ (Inverse) Projekto de internacia lingvo kreita de Arturo Alfandari en la jaro 1937.
- 44 F. Sufikso almetiĝanta al numeraloj kaj uzata por derivi vortojn, indikantajn unu el la egalaj partoj de tuto. ■ (Sen la lasta vokalo) specio de frakseno el

suda Eŭropo kaj Azio, kun okulfrapaj, verdete blankaj floroj.

VERTIKALE

1. Korallulo, kun pli-malpli grandaj, arboformaj skeletaj aksoj.
2. (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) kronologia sistemo, laŭ kiu oni kalkulas la tempon ekde aparta difinita tempopunkto. ■ (*Inverse*) rilata aŭ apartenanta al mi kaj aliaj.
3. Mekanikaĵo stangoforma (ofte cilindra), ĉirkaŭ kiu turniĝas pecoj de maŝino, aŭ kiu turnas tiujn pecojn.
4. Konsonanto. ■ Nepreciza vorto, uzata por montri al afero, kies nomon oni momente forgesis. ■
5. (*Akuzative*) sekreta instruo aŭ rito, rezervita al iniciitoj.
6. (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Mezurunuoj de pezo. ■ (*Sen la lasta vokalo*) unu el la kvar elementoj, distingitaj de la antikvuloj. ■
7. Punkto, de kiu io evoluis kaj disvolviĝis.

Rebuso



Kiujn bestojn vi vidis en Afriko?

SOLVOJ AL LA PASINTAJ KRUCVORTOKAJ REBUSO

	1	2	3	4	5	6	7	8
A	B	A	G	A	T	E	L	A
B	O	C	E	T	A	N	O	K
C	G	E		I	B		N	I
Ĉ	O	T		T	U	N	I	M
D	T	A	L	I	R		C	R
E	A	T		R	E		E	O
F	N	O	N	I	T	A	R	F

REBUSO

Tiel laborema kiel: *Formiko*

Sur la bildo *mi* aperas kaj *malproksime* la litero *K (=ko)*.

Do, for mi aperas ko, tio estas: formiko.

HUMURO

Ĉu vi montras
al mi vian
nazon?

Ne antaŭ
geedziĝo!



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Viceprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Fátima Jiménez García
José M^a Rodríguez Hernández
M^a Dolores Torres Mateo
Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)


Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org



Esperanto

La lingvo
internacia

La lengua
internacional



ISSN 1576 0618